

Johann Wolfgang von Goethe,

Roz' sur erikejo

tradukita de Konrad Matheus

Vidiĝis eta ruĝa roz'
de knab', sur erikejo.
Ĝi belis en matena ros'.
Hastis li al juna ŝos'
admiri ĝin kun ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Diris knab': "Mi rompos vin,
rozo sur erikejo."
Diris roz': "Dorn' pikos vin,
por ke vi ne forgesu min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Kaj knab' sovaĝa rompĉin ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend' roz' pikis lin.
Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin.
Venis sort' sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

*Traduko de la Germana poemo
"Heidenröslein" de JOHANN
WOLFGANG VON GOETHE
(*1749-08-28 - †1832-03-22) en
Esperanton de Konrad Matheus.*

*Arg-1022-2227 (2014-12-17
13:24:53)*

*S-ano Konrad Matheus loĝas en
Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim,
Germanio.*

Johann Wolfgang von Goethe,

Rozeto en herbejo

tradukita de Gotthilf Sellin

Knab' rozeton vidis li,
Vidis en herbejo;
Estis juna, bela ĝi,
Por ĝin vidi kuris li,
Vidis kun ĝojego.
Roz', rozeto, ruĝa roz',
Rozo en herbejo.

Diris knab': mi rompos vin,
Rozon en herbejo,
Diris roz': mi pikos vin,
Ĉiam vi memoros min,
Mi ne ĝin permesos.
Roz', rozeto, ruĝa roz',
Rozo en herbejo.

Knab' sovaĝa rompĉin ĝin,
Rozon en herbejo;
Kvankam roz' defendis sin,
En koler' ĝi pikis lin,
Tamen morti devis.
Roz', rozeto, ruĝa roz',
Rozo en herbejo.

*Traduko de la Germana poemo
"Heidenröslein" de JOHANN
WOLFGANG VON GOETHE
(*1749-08-28 - †1832-03-22)
en Esperanton de GOTTHILF
SELLIN (*1844-05-18 - †1921-
10-09).*

*Arg-1022-2071 (2014-12-16
16:00:17)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en
[http://kantaro.ikso.net/
rozeto_en_herbejo](http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo). Tie oni
povas aŭdi ankaŭ la melodion.
Pri la tradukinto vidu la retejon
[http://de.wikipedia.org/
wiki/Gotthilf_Sellin](http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin).*

Johann Wolfgang von Goethe,

Knab' rozeton vidis li

tradukita de Joachim Gießner

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,
vi rozeta floro“.
Diris roz': „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro“.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Knab' sovaĝa rompĉin ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufero pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Heidenröslein" de JOHANN
WOLFGANG VON GOETHE
(*1749-08-28 - †1832-03-22)
en Esperanton de JOACHIM
GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-
11-25).*

*Arg-1022-2225 (2014-12-16
16:29:14)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en
[http://arkivo.esperanto.
de/kantoj/kantoj.pdf](http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf).*